# LEA/G – INFORMILO
## (MAGAZINO)


**Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten**
**Libera (Laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj**

**Fondita (gegründet) 1956** | **Eldono nro.3** | **Aŭgusto 2003**

## Freundschaft - Amikeco

**Menschen, die Esperanto sprechen und benutzen, pflegen Freundschaften in der ganzen Welt!**

**Homoj, kiuj parolas kaj uzas la Lingvon internacian Esperanto, flegas amikecojn en la tuta mondo!**



**Keine Diskriminierung !**
**Freies Wort! Demokratie!**
**Jeder respektiert die Lebensweise des Anderen!**
**Und viele Werte mehr!**

**Neniam diskriminacio !**
**Libera interparolado!**
**La vivmaniero de la alia estas respektata!**
**Kaj multaj pli de la vivvaloroj!**

**Das alles gewährleistet die gemeinsame leicht erlernbare internationale Sprache *ESPERANTO!***

**Tion garantias la komuna facile lernebla Internacia lingvo *Esperanto!***

__Eldonanto – Herausgeber__
Libera (laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj (LEA/G)
Freier Arbeiter-Esperanto-Bund in deutschsprachigen Gebieten
Sekretario: Jiri PROSKOVEC
Heimbaustr.10, (DE)44143 Dortmund
Tel: 0231/551211
ePost: proskovec@yahoo.de -
LEA/G-Konto: PROSKOVEC, Jiri
Nro: 4907 260 00
Norisbank (BLZ 760 260 00)
__Redaktanto de LEA/G-Informilo:__
A.F.STEPHAN, Renchener Str.47
(DE)77704 Oberkirch (Baden)
Tel(inkl.fakso): 07802 – 90336
__Redaktas la interretan *MAGAZINOn*:__
Gary MICKLE, Brüsseler Str.6
(DE)13353 Berlin
GMICKLE@NEXGO.DE

*LEA/G-Informilo aperas minimume dufoje jare. __Abono:__ per donaco de minim. 10 Euro*
*__Membreco/Mitgliedschaft en LEA/G:__*
*8 Euro jare/jährlich (inklusivas liveradon/Lieferung de la Informilo kaj aliaj servoj/andere Dienste.*

Ligata: ASLE – Aûstria Socialista Ligo Esperantista, Vieno
Organo: La Socialisto
*(en LEA/G-Informilo)*

*__Pri la enhavo__ de sia teksto respondecas la ensendanto mem. La redakcio havas la rajton, mallon-gigi tekstojn kiam mankas spaco aûkaj ne akcepti ilin.*

*Ausstellung, Symposium, Filmreihe 07.03.03-11.03.03 im Polnischen Institut in Berlin*

## Jan Fethke (1903-1980)

Esperanto und Film waren seine Leidenschaften. In den zwanziger Jahren kommt er in die Filmmetropole Berlin, wird Regieassistent, schreibt Drehbücher. Als die Nazis an die Macht kommen, geht er nach Polen, Heimat seiner Mutter.

Im sozialistischen Polen wird Jan Fethke ein bekannter Regisseur und Drehbuchautor, liefert u.a. die Vorlage für den letzten großen Fritz-Lang-Film „Die 1000 Augen des Dr.Mabuse“ (1960). Die Premiere nimmt Fethke zum Anlass, sich nach Westberlin abzusetzen, wo er bis zu seinem Tod 1980 lebt.

Unter seinem Pseudonym *Jean Forge* zählt er zu den wichtigsten Autoren der Esperanto-Literatur.

*Esperanto kaj filmo estis la pasioj de Jan Fethke. En la dudekaj jaroj li venis en la filmmetropolon Berlin, fariĝis reĝisoran asistanton, verkis scenarojn. Kiam la Nazioj transprenas la potencon, li iras al Pollando, hejmlando de sia patrino.*

*En la socialista Pollando li estas konata reĝisoro kaj aûtoro de scenaroj, liveras i.a. la projekton por la lasta filmo de Fritz Lang "La 1000 okuloj de la Dro.Mabuse". La premieron instigas lin,distantigi sin de Pollando al okcidenta Berlin, kie li vivis ĝis lia morto en la jaro 1980.*

*Sub sia pseûdonimo Jean Forge li apartenis al la tre eminentaj aûtoroj de la Esperanto-Literaturo.*

LIBRO-SERVO
Dro.Wolfgagg Schwanzer
Pfarrer-Seeger-Str.9
55129 Mainz



## __Konstatoj__

### __La rimedoj__

(de Erich Fried)

La maldiligentaj estu hakitaj,
la mondo igas diligenta.
La malbelai estu hakitaj,
la mondo igas bela.
La stultuloj estu hakitaj,
la mondo igas saga.
La malsanuloj estu hakitaj
la mondo igas sana.
La malĝojaj estu hakitaj,
la mondo igas ĝoja.
La maljunuloj estu hakitaj,
la mondo igas juna.
La malamikoj estu hakitaj,
la mondo igas amika.
La malbonaj estu hakitaj,
la mondo igas bona.

*(elgermanigis: J.F.Bociort, Berlin)*

## Eraroj

En la eldono nro. 2 de la LEA/G-Informilo enŝteligis la erar-diablo:
*Titol-paĝo: En la kapo „LEA/G-INFORMILO“ vere estu verdkoloraj, bedaûrinde tio nur estis ebla en la fotokopiejo kontraû ekstra pago;*
*sur paĝo 4 – "Stupoj de la vivo" la traduko diferenciĝas plufoje al la traduko de Ratislavo; la redaktanto pardonpetas;*
*la artikoleton "Milito ne..." verkis Stephan, ne* Albert Stephas
*paĝo 6 – Franz Knoeferl nur posedas t.n. handy, kies numero ne estas konata;*
*Franz loĝas en 85302 Gerolsbach (ne Gerold-bach, Ritter-Gerold-Str.28*

* * *

# Renkontiĝis du politikaj kulturoj ĉe la SAT-kongreso

La proksimume 155 partoprenantoj de la ĉi-jara SAT-kongreso en la svisa horloĝista urbo ne povis plendi pro tro magra politika kaj kultura programo. La matenoj kaj posttagmezoj enhavis pli da aranĝoj ol iu ajn kapablis travivi, kaj la vesperoj ĝis noktomezo estis fordonitaj al la kulturo, precipe la indiĝena Esperanta. Tiun ĉi parton de la programo kompetente reĝisoris la Kultura Centro Esperantista – la organizanto de la kongreso.

Grava rezulto de la ĝeneralaj laborkunsidoj estis, ke SAT partoprenos sub la propra flago kaj per la propraj ideoj la Eŭropan Socian Forumon, kiu okazos fine de la jaro en St. Dénis apud Parizo. Kvar frakcioj okazigis proprajn kunvenojn ĉi-jare: la komunisma (5 kunvenoj!), la liberecana, sennaciisma kaj ekologiisma. Elstaraj estis la prelego de Jakvo Schram pri *Lingvo, klasbatalo kaj ĝia ligiteco*, kiu temigis precipe la historion de la lingvokonfliktoj en Belgio, ankaŭ la kongresinaŭgura prelego de Kep Enderby (kiu pro sankialoj bedaŭrinde malĉeestis, sed kies prelegon laŭtlegis Kreŝo Barkoviĉ) pri la tutmondiĝo.

Unu aspekto de la ĉi-jara kongreso estis verŝajne unikaĵo: la preskaŭ paralela renkontiĝo kun alia elemento de Esperantio. Tio estis la Esperanta Civito, kies Senato kunvenis samloke en la tago, kiam la plimulto de la kongresanoj ekskursis. La senpera interagado kun la Civitanoj estas laŭ mi nepre pozitive taksenda, ĉar ambaŭ grupoj estis spronitaj pli realisme pritaksi unu la alian:

- Renkontiĝo de SAT kaj la Civito estas renkontiĝo de du ne senplue akordiĝantaj politikaj kulturoj – SAT kun sia maldekstra, tie kaj tie revoluciema profilo kaj la Civito, imitanta laŭ siaj povoj la demokration de burĝaj ŝtatoj kaj kun mikronaciisme altpretenda kaj juron fetiĉiganta profilo (sed aliflanke jam impona faktoro de la Esperanta kulturo).
- La ĉi-jara "alfrontiĝo" esperebie montris, ke la diversloke en SAT aperinta malfido al la Civito estis superfluaĵo kaj troigo (kvankam la Civito mem en signifa grado generis ŝtormajn ondojn, kiam ĝi antaŭ du jaroj proponis, ke SAT aliĝu al ĝi – kaj implice al ĝiaj politikaj principoj, kiuj neniel estas tiuj de SAT).

Kiel atendeble, principa solvo por la ĉefa problemo, kiu plagas SAT – membroperdo kaj financa anemio – ne estis trovita, sed la kongreso interkonsiliĝis pri paŝoj por fortikigi tiun eksteran informadon en naciaj lingvoj, kiun SAT mem plenumas, unuavice per la TTT-ejo kaj ankaŭ per flugfolioj okaze de la Eŭropa Socia Forumo.

La Chaux-de-Fonds situas alte en la ĵurasa montaro. Multaj kongresanoj povis ĝui la svisan pejzaĝon se ne dumekskurse, tiam dum la ĉiutaga veturo al kaj de la kongresejo, ĉar la cirkonstancoj devigis loĝigi ilin tre dise, parte ekster la urbo.

Gary Mickle


BARCELONA ESPERANTO - CENTRO


**2-AJ SOMERAJ DIALOGOJ**
**ESPERANTO - RESTADEJO**
**Monistrol de Monserrat**
**Barcelono , Hispanio**

**6 - 7 Septembro 2003**

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton, la 6an, 11 h. Salutoj kaj bonvenoj. Prelegoj. E- leciono.Turisma vizito. Interkona vespero.
Dimanĉon, la 7an, 11 h. Informado de eksterlandaj gesamideanoj . Kunveno de Instruantoj de E- Kursoj. Prelego.E- leciono. Turisma vizito. Interkona vespero Adiaŭo.Ĉiu aliĝinto ricevos senpage, ekzempleron de la verko " La Homa Vivaventuro "de Giordano Moya

Bassegoda, 40, 3° 1ª
Teléfono 93 333 80 81
E - 08028 BARCELONA (Hispanio)

# Pensinstiga SATEB-semajnfino

Instrue estis partopreni la ĉi-jaran (2003 05 16-18) SATEB-semajnfinon en Barlastono. Jen aranĝo, kiu faras multon por doni al SATEB propran profilon inter la LEA-oj kaj mi bedaŭris, ke ĝi ne daŭris pli longe. Dum mia restado frapis min pozitive la politika kaj ĝenerala vigleco de la brita LEA, kiun mi jam iom konis per legado de la *Verda Proleto*, sed ankoraŭ ne de proksime.

Okazis dum la semajnfino i.a. la jarkunveno de SATEB, kunveno de SAT-anoj, prelegoj de Ken Keable pri la historio de Esperanto kaj la laborista movado kaj de Aleksandro Korĵenkov pri Varankin kaj lia romano *Metropoliteno*. Paul Hewitt prezentis la kompetente prizorgatajn TTT-projektojn *Labourstart* kaj *Vikipedio*. Dum la distra vespero aŭdiĝis ankaŭ kantoj de la laborista movado.

Okazis ankaŭ – kaj tial mi estis tre afable invitita de SATEB gaste partopreni la semajnfinon – du prelegoj de mi mem pri "Novdekstrismo kaj naciismo". La unua, titolita *La patrina lakto kaj la tero*, temigis (simplige dirite) la anstataŭigon de rasismaj doktrinoj per kulturismaj en reakciaj ideologioj, precipe en tiuj de la t.n. novdekstruloj. La dua, titolita *Novdekstraj kaj naciismaj influoj en la Esperanto-movado*, traktis la aperon kaj instrumentigon (en la "informado" pri Esperanto!) de ĝuste tiaj kulturismaj doktrinoj (etnoplurismo, lingvo-naciismo ktp.) sine de la esperantista komunumo dum la pasintaj jardekoj.


La Wedgwood Memorial College, la okazejo de la SATEB-semajnfino, situas sur granda, ĝardene tre flegata tereno en vilaĝeca ĉirkaŭaĵo – Barlastono rande de Stoke-on-Trent. Apudas la nove konstruita sidejo de la Esperanto-Asocio de Britio, aparta domo, en kiu diligente laboris dum nia restado prizorgantoj de la fama Esperanto-biblioteko Montagu Butler, nun ordigata.

Gary Mickle

SAT sennacieca asocio tutmonda ESPERANTO

67, avenue Gambetta
FR-75020 PARIS

# OKAZE DE PASKO 2004




**KONGRESMARKOJ**

Kontraŭ 2.30 eŭroj folio el 18 kongresmarkoj estas akirebla ĉe la **Libro-Servo de SAT-Amikaro** ***(Bernard Schneider, 38, avenue de la République, 94320 Thiais)***.

La **59-a SAT-Amikara Kongreso** okazos en urbo **La Roche-sur-Yon** (departemento **Vendée**) dum Pasko 2004.

---

GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

ARANĜITA DE LA
ESPERANTO-GRUPO „LABORO", MUNĤENO
Lic. N-ro V 189

Kongreskarto n-ro 855

nomo Karl Marx

adreso


DEUTSCHER ESPERANTO-KONGRESS

VERANSTALTET VON DER
ESPERANTO-GRUPPE „LABORO" MÜNCHEN
Lic. Nr. V 189

Kongres-sekretario Kongres-kasisto




*En Pekino, Ĉinujo.*







## Esperanto kurz gefasst (3)

**<u>Persönliche Fürwörter</u>**

**Ich = mi; du /Sie) = vi; er = li; sie = ŝi; es = ĝi; Wir = ni; ihr = vi; Anrede Sie (Mehrzahl) = vi; sie (Mehrzahl) = ili.**

**Die Fälle werden gebildet wie bei den Haupt-Wörtern.**

**<u>Die Besitzfürwörter</u> werden aus den persönlichen Fürwörtern gebildet durch Anhängen von –a, in der Mehrzahl –aj z.B.: mia = mein, viaj roboj = deine (Ihre) Kleider.**

**<u>Die Steigerung</u> bei Eigenschafts- und Umstandswörtern wird gebildet mit pli = mehr bzw. plej = am meisten z.B. bela – schön, pli bela – schöner, plej bela – am schönsten.**

***(Fortsetzung in Ausgabe 4 Dezember 03)***




*Nova PIV aperis !*
*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

KIAM LA LOKOMOTIVO FAJFIS...

*En nro.2 de la LEA/G-Informilo mi legis pri vaporlokomotivo, rakonto de Minĉev el Bulgario. Ĝi instigis min rakonti pri jenan okazaĵon, kiu supozeble povas amuzi resp. informi laŭ pedagogia vidpunkto:*

Ankoraŭ juna knabo mi estis lernanto en lernejo, kiu situis proksime de fervoja linio. Ni infanoj ne povis rigardi la vagonarojn, ĉar la fenestroj estis tro alte instalitaj kaj uzi niajn seĝojn ne taŭgis. Nur la instruisto sidante vis-a-vis de ni sufiĉe alte sur podio povis vidi, kion okazis ekstere.

Iun tagon ni aŭdis denove malproksime la fajfadon de vaporlokomotivo. Tiun okazaĵon uzis la instruisto por klarigi al ni fizikan regulon.

Venonta tago li alportis du ĉezilojn. Kiam denove iu lokomotivo fajfadis, li kontraŭfrapis la ĉizilojn kaj dum unu, du sekundoj ni ne plu povis aŭdi la sonon de la lokomotiva fajfilo.. "Vi do povas lerni, infanoj, la rapidecon de sono kiel ankaŭ de la lumo. La rapideco de lumo estas 300.000 km/s, sed de la sono malpli 340 m/s. Pro tio la soninterferookazata per la ĉeziloj nur daŭras kelkaj sekundoj."

*Mi esperas, ke mi korekte interpretis la fizikan okazaĵon.*

*Gilbert Lebec*


paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)

La Socialisto

Aŭstria Socialista Ligo Esperantista
Paulinengasse 13
A-1180 Wien.

## Ĉu globaligo de senpotenculoj?

Tra la tuta mondo furiozas la nocio "globaligo". Temas pri la globaligo de ekonomio, de financa kapitalo, de la grandaj konzernoj.



Stephansdom

Temas pri la fakto, ke estroj de tutmonde agantaj firmaoj havas pli da potenco ol kelkaj ŝtatoj (precipe en la tria mondo). Eĉ evoluiĝintaj "ricaj" ŝtatoj ne riskas fari politikon kiu povas esti kontraŭ la interesoj de la "veraj potenculoj de la mondo".

La konzernoj minacas per facila translokigo de fabrikoj kaj sekve de tio per perdo de laborlokoj (kaj impost-enspezoj). La elektitaj "popol-reprezentantoj" de la diversaj ŝtatoj obeas. Oni povas mediti, kio okazus, se ĉiuj ŝtatoj de la mondo komune kaj soliare rifuzus la ambiciojn de la konzernoj - kien tiuj iru? Sed reale tia solidareco ne ekzistas.



Kunsthistorisches Museum


La unusola rimedo kontraŭstari la agojn de la potenc- kaj profitavidaj grandfirmaoj estas denove globaligo - nome la globaligo de la senpotenculoj. Tiuj homoj, homgrupoj, organizoj, komunumoj, ktp., kiuj suferas sub la premo de la ekonomiaj gigantoj luktas - kaj malvenkas - ĉiu por si mem. Komuna mondvasta agado de laboristoj, konsumantoj, virinoj, eĉ infanoj estus rimarkebla ĝeno por la konzernestroj.

Ĉu Esperanto povus esti taŭga rimedo por kunagordi la mondon kontraŭ la konzernoj? Mi ne scias. Sed ni provu.

Kiel tekstas la proverbo :

Kiu batalas, povas malvenki.
Kiu ne batalas, jam malvenkis.

Reinhold Kammler



# Es Geht um Demokratie ! auch in der Sprachenfrage!

Ein Ja für die Globalisierung, wenn sie von den Bürgern und Völkern getragen wird!
Ein Ja für Demokratie im juristischen und faktischen Sinn auf der Basis von Gleichheit und Freiheit!

Rein juristisch gesehen kann sich jeder informieren und sich frei äussern.
Die Wirklichkeit sieht jedoch anders aus!

Die Massenkommunikationsmittel gehorchen einigen Finanzkräftigen. Es kommunizieren lediglich die "Eliten" und zwar mit Hilfe von Kapital und der Oberschicht.
Nur 5 % der Menschheit kann sich auf internationaler Ebene adäquat ausdrücken
Und die anderen 95 %?

## Und Sie ?

Neben unserer Muttersprache brauchen wir eine gemeinsame, unabhängige Sprache, zu der alle einen Zugang haben,
eine Sprache,die keine Kultur unterdrückt,
eine Sprache,die keine Minderheit ausgrenzt.

Nur ESPERANTO ermöglicht
eine Kommunikation unter Gleichberechtigten,
eine Kommunikation, die demokratisch und brüderlich ist.

Nehmen Sie mit S.A.T., der weltweiten Vereinigung der Arbeiteresperantisten, Kontakt auf. :

Jiri PROŜKOVEC
Heimbau str. 10, DE-44143 Dortmund, Deutschland
proskovec@aol.com

# Temas pri demokratio ! ... inkluzive lingva !

Jes por tutmondiĝo konstruita de la civitanoj kaj popoloj

Jes por demokratio jura kaj fakta, bazita sur egaleco kaj libereco

Jure, ĉiu povas informiĝi kaj sin esprimi libere.

## Sed fakte, Ne !

La amasinformiloj obeas al la financaj potenculoj kaj nur komunikas la " elitoj " helpe de mono kaj de la supera klaso.
Nur 5% de la homaro povas sin esprimi kontentige !
Kaj la aliaj ? (95 %)

## Kaj Vi ?

Apud nia gepatra lingvo ni bezonas lingvon komunan, sendependan, alireblan al ĉiuj,
kiu subpremas neniun kulturon,
kiu eliminas neniun minoritaton.

Nur ESPERANTOebligas
komunikadon inter egaluloj,
komunikadon demokratan kaj fratecan.

Kontaktu S.A.T. (Unuiĝo de la laboristaj esperantistoj el la tuta mondo)
67, avenue Gambetta
75020 PARIS (Francio)
<satesper@noos.fr>
http://www.sat-esperanto.org

**"11a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO" SANTA SUSANNA 4-11/10 2003**

**Korespondaj adresoj kaj informoj: Santiago Torné Grau, Tel: 937253421; Apartat 423, ES-08200 SABADELL (Hispanio) aŭ Luis Serrano Pérez, Tel: 937275021; Faksilo 937314111 (ne dum aŭgusto) Rete: <luis_serrano@mixmail.com>**

